

Ŝanĝitaj Roloj

Kiel la viroj miris, kiam ni metis niajn akiraĵojn sur la teron. „*Heavens!*“ Meißner ekstarigis. „Tio ja estas du kukluksanoj! Ĉu ili mortas?“

„Esperinde ne“, la *scout* diris. „Vi vidas, ke mi agis ĝuste, kiam mi kunprenis tiun junan *master*:on. Li kondukis dece, eĉ subigis la estron de la grupaĉo.“

„Ĉu la estron? Ha, tio bonegas! Sed kie estas liaj anoj, kaj kial Vi enportis tiujn du?“

„Ĉu mi vere eldiru tion? Ja estas facile divenebla. Mia kunulo tie kaj mi surmetos la vestaĵojn de la du fibuboj, kaj enigis la grupaĉon, kiu kaŝiĝas je la stalo.“

„Ĉu la diablo Vin regas? Vi riskas Vian vivon! Kio, se oni rimarkos, ke Vi estas falsaj kukluksanoj?“

„Tion oni ja ne rimarkos“, la maljunulo ridetis trankvilanime. „Old Death estas ruzeca ulo, kaj tiu juna *master* ankaŭ ne estas tiel stulte, kiel li aspektas.“

La *scout* rakontis, kion ni estis aŭskultintaj kaj farintaj, kaj tiam klarigis sian planon al la viroj. Mi, kiel Locksmith, iru malantaŭ la stalon pro enkonduki la kukluksanoj. Li volis surmeti la vestaĵojn de la *capt'n*, kiuj ĝustis al lia longeco, kaj roli kiel la estro.

„Plu nur dirindas“, li aligis, „ke nur estos parolata mallaŭte, ĉar flufrante ĉiuj voĉoj sonas same.“

„Nu, se Vi volas riski tion, ĝin faru!“ Lange komentis. „Vi ja ne vendas niajn haŭtojn, sed nur Viajn. — Sed kion faru ni intertempe?“

„Unue eliru mallaŭte, kaj enportu kelkajn dikajn palisojn aŭ stangojn, kiujn ni povos stemi kontraŭ la ĉambra pordo, proke ĝi ne povas esti malfermata de interne, kiam tio estos necese. Post tio Vi estingu la lumojn, kaj kaŝiĝu en la domo. Tio estas ĉio, kion Vi faru. Kio farindos krome, ni ne jam povas scii.“

La patro kaj la filo iris sur la korton pro alporti la palisojn. Dum tio ni deprenis la nigrajn maskaĵojn kun la blankaj, surkudritaj insignoj de la du senkonsciigitoj. La insigno de la estro estis ponardo, aplikita sur la kapuĉo, la brusto kaj la femuro, tiu de la *locksmith* estis ŝlosilo je la samaj lokoj. La ponardo do estis la insigno de la estro. La viro, kiu sidis en la gastejo, estis nomita ‚heliko‘. Do li supozeble dum liaj kaŝaj agoj surhavis maskaĵon ornamita per helikoj. Ĵus kiam ni tiris la pantalonon de la korpo de la estro, kiu estis kudrita en la maniero de la svisaj sovaĝfojnfaristoj, kaj estis metita sur la vera krurvesto, li vekis. Li vidis konfuzite kaj mirigite ĉirkaŭ si, kaj tiam faris ekmoviĝon ekstarigi, dum kio lia mano etendiĝis al la loko, kie estis antaŭe troviĝinta la revolveroj sur lia korpo. Sed Old Death rapide lin repremis suben, tenis la pinton de la *bowie*-tranĉilo sur lian bruston, kaj minacis:

„Trankvile, bubo! Nur unu nepermesita sono aŭ unu movo, kaj tiu bela ŝtalo iĝos en Vian karnon!“

La kukluksano estis viro ne multe pli aĝe ol tridekjara kun soldatece tranĉita barbo. Lia eĝhava, malhele nuancita kaj per diboĉa vivo trajtita vizaĝo supozigis, ke li estis sudlandano. Li metis ambaŭ manojn sur la dolorantan kapon, tien kie la batego estis trafinta lin, kaj demandis:

„Kie mi estas? Kiu vi estas?“

„Ĉi tie loĝas Lange, kiun Vi volis ataki“, Old Death klarigis. „Kaj tiu juna viro kaj mi estas la germanoj, pri kiuj la ‚heliko‘ eksciis, kie ili estas. Vi vidas, ke vi estas tie, kien via sopirado pelis vin.“

La viro kunpremis la lipojn, kaj ĉirkaŭĵetis sovaĝan, terurigitan vidon. Ĵus tiam Lange kaj sia filo revenis. Ili kunhavis kelkajn stangojn kaj segilon.

„Ni havas ŝnuregojn pro fiksligi, sufiĉe por dudek viroj“, la patro diris.

„Do donu ilin, sed nun nur por tiuj du!“

„Ne, mi ne lasos fiksligi min!“ la estro vokis, denove provante ekstarti. Sed tuj Old Death tenis la tranĉilon kontraŭ li.

„Ne risku denove moviĝi! Oni nomas min Old Death, kaj vi certe scias, kion tio signifas. Aŭ ĉu vi pensas, ke mi estas amiko de la sklavbridistoj kaj kukluksanoj?“

„Vi estas Old — ĉu Old Death?“ la *capt'n* balbutis plej ege terurigite.

„Jes, bubo, tiu mi estas. Nun vi certe ne plu havos senutilajn imagaĵojn. Mi scias, ke vi volis pendigi la junan Lange:n, kaj lasi vipadi lian patron ĝis la ostoj videblus, kaj tiam bruligi tiun domon. Se vi volas ekspekti ian ajn indulgon, antaŭ ĉio necesas al vi, ke vi nun trankvile lasas vin al via sorto.“

„Old Death!“ ripetis la estro, kiu estis paliĝinta mortulece. „Tiukaze mi pereos!“

„Ne jam. Ni ne estas senhontaj murdistoj kiel vi. Ni havos indulgon pri viaj vivoj, se vi kapitulacos sen batalo. Se vi faros tion ne, oni ĵetos viajn mortajn korpon en la riveron morgaŭ. Mi nun diros al vi ĉion necesan. Se vi agos laŭ tio, vi povas forlasi la *county*:n, kaj laŭ mi ankaŭ Texas:on pro neniam reveni poste. Sed se vi malatentas mian konsilon, vi pereos. Mi nun envenigu viajn homojn. Ili estos niaj kaptitoj, same kiel vi. Ordonu al ili kapitulaci! Se vi ne faros tion, ni mortpafos vin ĉiujn teren kiel aron da sovaĝaj kolumboj.“

La kukluskano estis katenata, kaj ricevis mantukon en la buŝon. La alia ankaŭ estis rekonsciüginta, sed preferis ne diri unu vorton. Ankaŭ li estis katenata kaj kvietigata. Tiam oni portis ilin ambaŭ eksteren sur la litojn, sur kiuj Lange kaj sia filo norme dormis, fiksigeis ilin tie prizorge, tiel ke ili ne povis moviĝi, kaj oni kovris ilin ĝis sub la kolon.

„Nu!“ Old Death ridis. „Nun la burleskaĵo povas komenci! Kiel la uloj miriĝos, kiam ili ekkonas, ke tiuj pacemaj dormantoj estas iliaj kunbuboj! Ĝi estos eksternorma plezuro al ili. Sed diru, Mr. Lange, kiel oni do povos, kiam ni havos ilin, paroli kun tiuj homoj, sen ke ĝi eblas, ke ili povas vidi aŭ ekkapti nin? Oni devus rigardi ilin dum tio.“

„Hm“, la demandito diris, dum li montris al la plafono, „de tie supre. La plafono nur estas ebenaĵo el tabuloj. Ni devus forigi unu el la tabuloj.“

„Do ĉiuj kunvenu eksteren, kaj kunprenu Viajn armilojn! Vi supreniru laŭ la ŝtuparo, kaj restu tie ĝis la ĝusta tempo. Sed antaŭe ni zorgu pri taŭgaj stemiloj.“

Kelkaj el la stangoj estis mallongigitaj per la segilo tiel, ke ili ĝustis ekzakte al la intencita celo, kaj tiam tenitaj prete. Mi surmetis la pantalonon kaj la ĉemizon de la *locksmith*, dum Old Death iĝis en la alian maskaĵojn. En la vasta poŝo de mia pantolono estis ringo kun amaso da ŝlosiloj kaj dirkoj.

„Vi tute ne bezonos ilin“, Old Death diris. „Vi ne estas seroristo kaj ankaŭ ne enrompisto, kaj nur evidentiĝos per Via malsperteco. Vi deprenu la ĝustajn ŝlosilojn tie ĉi, kaj poste agu, kvazaŭ Vi malfermas per la dirko. Ni enpoŝigos niajn tranĉilojn kaj revolverojn. Sed niajn pafilojn transprenos tiuj *gentleman*-oj tie ĉi, kiuj supre gardiĝe lozigos unu tabulon, dum ni plenumos nian taskon ekstere. Kaj ni estingu ĉiujn lumojn.“

Tiu ordono estis obeata. Oni lasis nin iri tra la pordo, kaj ekstere mi ŝlosis la pordon. Mi kunhavis nur la tri ŝlosilojn al la doma, vivĉambra kaj dormĉambra pordo ĉe mi. Old Death denove ekzakte eldiris siajn ordonojn al mi. Kiam ni aŭdis la bruon, kiu estis kaŭzata de la forigo de la tabulo, ni disiris. Li iris al la flanko de la pordo, kie estis la stangoj, kaj mi iris trans la korto, pro venigi miajn karajn kamaradojn. Mi turniĝis al la stalo kaj ne paŝis tro mallaŭte dum tio, ĉar mi ja volis esti rimarkata kaj alparolata, pro ne fari fuŝaĵon per mia alparolo. Ĵus kiam mi estis irinta ĉirkaŭ la angulo, figuro ekstaris de la tero, per kiu mi estis preskaŭ falinta.

„*Stop!*“ la viro diris. „Ĉu estas vi, *locksmith*?“

„*Yes*. Vi venu, sed mallaŭte! Lasu la pafilojn malantaŭ la stalo. Tranĉiloj kaj revolveroj sufiĉos.“

„Mi diros tion al la leŭtenanto. Atendu tie ĉi!“

Li ekforiris. Do tiu grupaĉo ankaŭ havis leŭtenanton. La ku-kluks-klano ŝajnis havi armean strukturon. Mi ne estis atendinta minuton, kiam venis alia. Li diris mallaŭte:

„Tio daŭris longe. Do ĉu la damnindaj germanoj finfine dormas?“

„Finfine! Sed ankaŭ nun des pli profunde. Ili findrinkis plenan kruĉon da brando kune.“

„Do la ludo facilos al ni. Kio pri la pordoj?“

„Ĉio eblas facilege.“

„Tiukaze ni komencu. La meznokto jam pasiĝis. Unu horon poste oni ankaŭ ekagos transe ĉe Cortesio. Gvidu nin!“

Malantaŭ li aperis pluraj maskitaj viroj, kiuj sekvis min. Kiam ni atingis la domon, Old Death paŝis mallaŭte al ni. En la malhelo lia figuro ne estis distingebla de tiu de la estro.

„Ĉu Vi havas specialajn ordonojn, *capt'n*?” la dua oficiro demandis.

„Ne“, la maljunulo respondis en memcerta, kvazaŭnatura maniero. „Ĉio okazigos laŭ la cirkonstancoj, kiujn ni trovos interne. Nu, *locksmith*, ni eklaboru pri la pordo.“

Mi tenis la ĝustan ŝlosilon prete, sed mi agus, kvazaŭ mi unue provu kelkajn aliajn. Kiam mi estis malferminta, mi restis starante ĉe Old Death, pro lasi la grupaĉon eniri preter ni. Ankaŭ la leŭtenanto restis ĉe ni. Kiam ĉiuj estis mallaŭte irintaj en la domon, li demandis:

„Ĉu ni lumigu lanternojn?”

„Unue nur Vian.“

Ni ankaŭ enpaŝis. Mi refermis la pordon, sed ne ŝlosis ĝin. La leŭtenanto elpoŝigis lumantan blendlanternon el lia vasta pantalono. Liaj vestaĵoj estis ornamitaj per blankaj aplikaĵoj en la formo de *bowie*-tranĉilo. Ni estis nombrintaj dek tri kukluskanoj, do kun la du kaptitoj sur la litoj ili estis ensume dek kvin viroj. Ĉiu portis alian signon. Ties kugloj, duonlunoj, krucoj, serpentoj, steloj, ranoj, radoj, koroj, tondiloj, birdoj kaj aliaj bestoj. La leŭtenanto lumis ĉirkaŭen, dum la aliaj staris senmove, kaj tiam demandis:

„Ĉu ni surpostenigu iun ĉe la pordo?”

„Pro kio?” Old Death respondis. „Ne necesas. Locksmith ŝlosu ĝin. Tiam neniu povos eniri.“

Mi tuj ŝlosis la pordon, pro ne lasi al la leŭtenanto kaŭzon de pridubo, sed lasis la ŝlosilon en la pordo.

„Ni eniru ĉiuj“, Old Death nun diris. „La forĝistoj estas fortegaj uloj.“

„Do Vi agas hodiaŭ tute alimaniere, *capt'n*!”

„Ĉar la cirkonstancoj alias. Ek!”

La *scout* ŝovis min al la vivĉambra pordo, je kiu ripetiĝis la sama procedo kiel je la dompordo. Mi agis, kvazaŭ mi ne tuj trovis la ĝustan ŝlosilon. Tiam ni ĉiuj eniris. Old Death prenis la lanternon el la mano de la leŭtenanto, kaj lumis al la dormĉambra pordo.

„Tra tie!” li ordonis. „Sed mallaŭte!”

„Ĉu ni nun elpoŝigu la aliajn lanternojn?”

„Ne, nur en la dormĉambro.“

Per tiu ordono Old Death volis eviti, ke la ‚profunde dormantoj‘ estis tro frue rekoneblaj. Estis sufiĉe da spaco por la dek kvin personoj en la ĉambreto. Nur gravis, ke ni enirigis ilin ĉiujn, proke la embusko ne vastiĝis ĝis en la vivĉambro. Finfine la pordo estis malfermigata. Old Death lasis la lumon de la lanternon brili en la ĉambreton, envidis, kaj flustris:

„Ili dormas. Rapide eniru, sed gardiĝe! La leŭtenanto unue!”

Li ne lasis tute neniun tempon al la oficiro pro kontraŭo aŭ pripenso, ŝovis lin antaŭen, kaj la aliaj sekvis per mallaŭtaj paŝoj. Sed ĵus kiam la lasta estis enirinta, mi ekfermis la pordon kaj turnis la ŝlosilon.

„Rapide, la stangojn!“ Old Death urĝis.

Ili kuŝis tie, ĵus tiel longaj, ke oni povis premi ilin deklive inter la fenestra framon kaj la pordan eĝon. Tion ni faris, kaj nun la forto de elefanto estus bezonita pro puŝi la pordon malferme. Nun mi hastis elen al la ŝtuparo.

„Ĉu Vi pretas?“ mi demandis supren. „Viaj malamikoj estas en la embusko. Venu malsupren!“

La viroj saltante venis de supre.

„La kukluksanoj ĉiuj troviĝas en la dormĉambro“, la *scout* raportis. „Tri el Vi eliru al la fenestro pro stemi stangojn kontraŭ ĝi! Ajn kiu volas elrampi, ricevu kuglon!“

Mi remalfermis la malantaŭan pordon, kaj tri viroj hastis elen. La aliaj sekvis min en la vivĉambro. Intertempe estis terura bruego eksoninta en la dormĉambro. La trompitaĵoj estis rimarkintaj, ke ili estis enŝlositaj, elpoŝigitaj iliajn lanternojn kaj ekrimarkintaj per la brilo de la lumo, kiu kuŝis sur la litoj. Nun ili malbenis kaj vokegis sovaĝe konfuzigite, kaj frapegis sur la pordon per la pugnoj.

„Malfermu, malfermu, aŭ ni disbatos ĉion!“ oni vokis.

Kiam iliaj minacoj ne sukcesis, ili provis diskrevigi la pordon, sed ĝi ne cedis, la stemiloj restis fortikaj. Tiam ni aŭdis, ke ili malfermis la fenestron, kaj provis malfermpuŝi la kovrilon.

„Ne eblas!“ kolera voĉo vokis. „Oni stemis ion kontraŭ ĝi.“

Tiam ni aŭdis mokantan vokon de ekstere.

„For de la kovrilo! Vi estas kaptitaj. Ajn kiu malfermas la kovrilon, ricevos kuglon!“

„Jes“, Old Death en la vivĉambro laŭte aligis. „Ankaŭ la pordo estas okupata. Jen staras sufiĉe da homoj pro eksendi vin al la transejo. Demandu vian *capt'n*:on, kion vi faru!“

Kaj pli mallaŭte li diris al mi:

„Kunvenu sur la subtegmenton! Kunprenu la lanternon kaj vian pafilon! La aliaj lumigu la lampon tie ĉi.“

Ni iris supren, tien kie troviĝis ĵus super la dormĉambro malplena subtegmentaĵo. Facile ni trovis la lozigitan tabulon. Post ni estis kovrintaj nian lanternon kaj demetintaj la kapuĉojn, ni levis la tabulon, kaj povis nun vidi malsupren en la dormĉambro, kiu estis heligita de pluraj lanternoj.

Tie staris la kukluksanoj dense unu flanke de la alia. Oni estis depreninta la katenojn kaj buŝoŝtopilojn, kaj la estro parolis mallaŭte kaj, laŭŝajne, insiste al la homoj.

„Hoho!“ la leŭtenanto ĵus nun diris pli laŭte. „Ni kapitulacu, ĉu? Kiom da uloj do estas kontraŭ ni?“

„Pli ol sufiĉe, pro terenpafi vin ĉiujn dum kvin sekundoj!“ Old Death vokis malsupren.

Ĉiuj okuloj direktiĝis supren. En la sama momento ni aŭdis pafon kraki ekstere, kaj duan. Old Death tuj komprenis, kion tio signifis, kaj kiel ĝi povis esti utila al li.

„Ĉu vi aŭdis tion?“ li kontinuis. „Viaj amikoj ankaŭ estas akceptataj per kugloj ankaŭ tie transe ĉe Cortesio. La tuta urbo La Grange estas kontraŭ vi. Oni ja certe sciis, ke vi estas tie ĉi, kaj estis pretiginta bonvenigon al vi, kian vi ne espektis. Ni ne

bezonas ku-kluks-klanon. En la ĉambro flanke de vi atendas dek du viroj, ekstere antaŭ la kovrilo ses, kaj ni ĉi supre estas ankaŭ sesope. Mia nomo estas Old Death, kompreninde! Mi lasas al vi dek minutojn. Se vi tiam formetos la armilojn, ni traktos vin indulgeme. Sed se vi faros tion ne, ni pafos vin ĉiujn teren. Krome ne direndas nenion al mi, tio estas mia lasta oferto. Pensu pri tio!“

Li ĵetis la tabulon reen sur la truon, kaj mansignis al mi.

„Nun rapide malsupren, ni helpu al Cortesio!“

Ni kunvenigis du virojn el la ĉambro, kie Lange kaj sia filo restis, kaj du for de antaŭ la fenestro, kie unu gardisto sufiĉis tiumomente. Tiel ni estis sesope. Denove pafokrakis. Ni hastis transen kaj rimarkis tie kvar aŭ kvin maskitaj figuroj. Same multe ĵus venis kurante de malantaŭ la domo de Cortesio, kaj unu vokis, boneble pli laŭte, ol li intencis:

„Malantaŭe ili ankaŭ pafas! Ni ne povas eniri!“

Mi estis kuŝiĝinta sur la teron, rompinta pli proksimen, kaj aŭdis, ke unu el tiuj, kiuj estis starintaj antaŭe, respondis:

„Damna afero! Kiu povis antaŭscii tion? La hispano flaris la danĝeron, kaj nun vekas ĉiujn najbarojn per liaj pafoj! Ĉie oni bruligas lumojn. Oni jam aŭdas paŝojn de tie malantaŭe. Oni persekutos nin jam post kelkaj minutoj. Ni hastu. Ni disbatu la pordon per la teniloj! Ĉu ni eku?“

Mi ne atendis la respondon, sed urĝe hastis reen al la kunuloj.

„*Mes'sur*:oj, rapide, per la teniloj sur la grupaĉon! Ili volas ŝtormi la pordon de Cortesio.“

„*Well, well!* Dece sur ilin!“ estis la respondo, kaj jam falis la bategojn sur la malesperajn fiulojn kiel pluego el la nuboj. Ili kriante forfuĝis, kaj lasis kvar kunulojn tie, kie estis trafitaj tiel ege, ke ili ne povis forkuri. Ili estis senarmiligitaj. Nun Old Death paŝis al la doma pordo de Cortesio, pro frapi.

„Kiu tie?“ oni demandis de interne en la hispana.

„Old Death, *señor*. Ni pelis la fiulojn el la proksimeco. Malfermu! Sed ne ektimu pri mia maskaĵo!“

La pordo estis gardiĝe malfermata. La hispano rekonis la *scout*-on, kvankam tiu ankoraŭ surhavis la pantalonon kaj ĉemizon de la estro.

„Ĉu ili vere forestas?“

„Trans la montoj. Ni kaptis kvar el ili. Vi ja pafis al ili, ĉu?“

„Jes. Estis feliĉo, ke vi avertis min, alikaze mi estus fartinta tre malbone. Mi pafis antaŭe, kaj mia negro malantaŭe el la domo, tiel ke ili ne povis enveni. Tiam mi vidis, ke Vi atakis la grupaĉon.“

„Jes, ni savis Vin. Sed nun venu kaj ankaŭ helpu al ni. La kukluksanoj ne revenos al Vi, sed ni ankoraŭ havas dek kvin da tiuj uloj tie transe, kiujn ni ne volas lasi foriri. Dum tiu Via negro kuru de domo al domo kaj alarmu. La tuta La Grange veku, proke oni povos doni bonan lekcionon al tiuj buboj.“

„Do Hektor antaŭ ĉio kuru al la *sheriff*. — Vidu, jen venas homoj! Mi tuj estos transe ĉe Vi, *señor*.“

Cortesio reeniris en la domon. De dekstre aperis du viroj kun pafiloj en la manoj, kaj demandis, kial oni estis pafintaj tie ĉi. Kiam ni estis informintaj ilin, ili tuj pretis helpi al ni. Eĉ la enloĝantoj de La Grange, kiuj havis secesionistajn opiniojn, ja ne nur tial havis simpatian pri la ku-kluks-klano, kies agado devis esti teruraĵo al ano de ĉia politika partio. Ni ekprenis la kolumojn de la kvar lezitoj, kaj ŝiris ilin transen en la vivĉambron de Lange. La forĝisto raportis al ni, ke la kukluksanoj estis kondukintaj trankvile ĝis nun. *Señor* Cortesio postvenis, kaj baldaŭ sekvis tiom da enloĝantoj de La Grange, ke la ĉambro ne plu sufiĉis por ili, kaj kelkaj devis resti ekstere. Estis amaso da voĉoj, kaj bruo de jen kaj reen kurantaj paŝoj, per kio la kukluksanoj povis ekkoni, kiel la situacio estis. Old Death denove mansignis al mi kuniri supren al la subtegmento. Kiam ni denove estis forigintaj la tabulon, videbliĝis al ni sceno de kviete kolera malespero. La kaptitoj apogis sur la muroj, sidis sur la litoj aŭ kuŝis sur la tero, kaj malgaje fiksrigardis antaŭen.

„Nu“, Old Death diris, „la dek minutoj pasiĝis. Kion vi decidis?“

Li ne ricevis respondon. Nur unu elpuŝis malbenaĵon.

„Vi silentas, ĉu? Nu, do mi supozas, ke vi ne volas kapitulaci. La pafado komencu.“

La scout alŝultrigis sian pafilon, kaj mi la mian. Strange al neniu tie malsupre ekideis direktigi sian revolveron al ni. La fiuloj estis malkuraĝaj. Ili kuraĝo nur montriĝis dum perfortaĵoj kontraŭ sendefenduloj.

„Do respondu, aŭ mi pafos!“ la maljunulo minacis. „Estas mia lasta vorto al vi.“

Neniu diris vorton. Old Death flustris al mi:

„Ankaŭ Vi pafu! Ni devas trafi, alikaze ni ne kaŭzos la ĝustan impreson. Celu al la mano de la leŭtenanto, mi celos al tiu de la *capt'n*! Pafu!“

Niaj du pafoj krakis samtempe. La kugloj trafis bone. La du estroj ekkriis laŭte, kaj baldaŭ poste kriis kaj hurlis la tuta grupaĉo en naŭza ĥaoso. Niaj pafoj estis aŭditaj. Oni kredis, ke ni batalis kontraŭ la kukluksanoj. Tial estis krakoj ankaŭ en la ĉambro kaj ekstere antaŭ la fenestro. Kugloj flugis tra la pordo kaj tra la kovrilo en la dormĉambron. Pluraj kukluksanoj estis trafitaj. Ĉiuj faliĝis sur la teron, kie ili sentis sin save, kaj kriis, kvazaŭ ili estu rostataj sur la torturofosto. La estro surgenuis antaŭ unu lito, estis volvinta sian manon en tukpecon, kaj vokis supren al ni:

„Ĉesu! Ni kapitulacas!“

„Bone!“ Old Death komentis. „Ĉiu foriru de la litoj. Ĵetu viajn armilojn sur ilin, tiam oni lasos vin elen. Sed ajn kiu, ĉe kiu ni trovos armilon poste, senkondiĉe havos mian kuglon en la ventro! Vi aŭdas, ke tie ekstere staras centoj da homoj. Nur kompleta kapitulaco povos savi vin.“

La situacio de la sekretunuiĝantoj estis senespera, ĉar ili ne havis unu ŝancon fuĝi. Tion ili sciis. Se ili kapitulacus, kio povus esti farontaj al ili? Ilia intenco ne estis realigita. Oni do ne povis akuzi ilin esti farinta krimaĵon. Ĉiukaze ĝi estis pli bone obei al la volo de Old Death, ol fari senutilan provon iel forkuri perforte. Tial iliaj tranĉiloj kaj revolveroj flugis sur la litojn.

„Bone, *meŝ'ŝur*:oj!“ la maljunulo vokis al ili. „Kaj nun mi volas nur diri al vi, ke mi ankaŭ tuj mortpafos ĉiun, kiu faros moviĝon pro repreni sian armilon, kiam la pordo estos malfermata. Atendu unu momenton plu!“

Li sendis min malsupren en la vivĉambron, pro porti la ordonon al Lange, ellasi la kukluksanoj, kaj fiksligi ilin. Sed la realigo de tiu tasko ne estis tiel facile kiel ni estis pensintaj. La tuta, de rapide alportitaj lanternoj lumigita koridoro estis dense plena je homoj. Eŝcepte la kapuĉo, mi ankoraŭ surhavis la maskaĵojn, tiel ke oni supozis min esti ano de la sekretgrupaĉo, kaj tuj subigis min. Oni tute ne atentigis pri mia kontraŭo. Mi ricevis puŝojn kaj batojn amase, tiel ke la trafitaj ejoj doloris ankoraŭ post tagoj. Oni tuj volis konduki min antaŭ la domon, kaj tie linĉi min.

Mia situacio estis ege serioza, ĉar miaj atakantoj ne konis min. Antaŭ ĉiuj ĝi estis alta, rigidfigura homo, kiu senĉese batis sian pugnon sur mian flankon kaj dum tio vokegis:

„Elkonduku lin, elen! La arboj havas branĉojn, belajn branĉojn, belegajn branĉojn, fortajn branĉojn, kiuj certe ne disrompiĝos, kiam tia homaĵo estos pendigata de ili.“

Dum tio li pelis min al la malantaŭa pordo.

„Sed, Sir“, mi kriis al li, „mi ja ne estas kukluksano. Nur demandu *Mr. Lange*!“

„Belaj branĉoj, belegaj branĉoj!“ li ripetis dum denova puŝo sur mian kokson.

„Mi postulas esti kondukata al *Mr. Lange* en la vivĉambron! Mi surmetis tiun maskaĵon nur pro —“

„Vere belegaj branĉoj! Kaj ŝnuregon oni ankaŭ trovas en La Grange, fajnan ŝnuregon el bona kanabo!“

Li puŝis min plu, kaj batis min denove per la pugno tiel sur la flankon, ke mia pacienco finfine elĉerpiĝis. Tiu ulo kapablis instigi la homojn tiel, ke ili vere linĉus min. Se mi nur estus elirinta, nenio bone estis esperinda plu.

„*Sir*“, mi nun vokegis al li, „ĉesu Viajn krudaĵojn! Mi volas al *Mr. Lange*, ĉu komprenite?“

„Belegaj branĉoj! Nekompareblaj ŝnuregoj!“ li kriis eĉ pli laŭte, kaj traktis min per forta batego sur la ripoj. Tio estis la momento, kiam mia sango transbolis. Per ĉiu forto mi batis mian pugnon sub lian nazon, ke li certe estus faleginte malantaŭen kaj sur la teron, se tie estus estinta la sufiĉa spaco. Sed la homoj staris tro dense. Sed mi ricevis iom da spaco. Tiun ŝancon mi uzis tuj, kaj antaŭeniĝis perforte, vokegis per ĉiu forto, kaj kvazaŭ furioze disdonis puŝojn, batojn kaj bategojn, antaŭ kiuj oni almenaŭ cedis tiom, ke mi batis por mi etan strateton, sur kiu mi atingis la vivĉambron. Sed dum mi uzis miajn pugnoj tiel forte antaŭe, la strateto tuj rekuniĝis malantaŭ mi, kaj ĉiuj brakoj, kiuj povis atingi min, ekagis, tiel ke laŭvorte hajlis batojn sur min. Ve al la vera kukluksano, kiam jam falsa estis tanata blue en tia maniero!

La rigidfigurulo estis sekvinta min same rapide. Li kriis kiel pikita porko, kaj atingis la ĉambron preskaŭ samtempe kun mi. Kiam Lange ekvidis lin, li demandis:

„Pro la volo de Dio, kio okazas, kara *Sir*? Kial Vi krias? Kial Vi sangas?“

„Pendigu tiun kukluksanon de la arbo!“ la kolerulo vokegis. „Li enpremis mian nazon, kaj elbatis la dentojn, du aŭ tri aŭ kvar. Bonegaj dentoj! La solajn, kiujn mi ankoraŭ havis antaŭe en la buŝo. Pendigu lin!“

„Ĉu tiu?“ Lange demandis, montrante al mi. „Sed *Sir*, estimata *Sir*, tiu ja ne estas kukluksano! Li estas nia amiko, kaj ĵus al li ni ŝuldas, ke ni kaptis tiujn ulojn! Sen li, ni kaj *Señor Cortesio* ne plu estus vivantaj, kaj nia domoj estus en flamoj!“

La rigidfigurulo ekmalfermis la okulojn kaj la sangan buŝon vaste, kaj montris al mi.
„Sen — sen — ĉu tiu?“

Belega sceno! Ĉiuj ĉirkaŭstarantoj ridis. Li forviŝis la ŝviton de la frunto kaj la sangan de buŝo kaj nazo per mantuko, kaj mi tuŝetis miajn diversajn ejojn, je kiuj ankoraŭ poste la premsignoj de liaj manostoj estis videblaj.

„Jen Vi ĝin aŭdas, *Sir!*“ mi vokegis al li dum tio. „Vi ja estis komplete furioze pri pendigi min! Per Viaj damninda batoj mi sentas ĉiun osteton en mia korpo. Vi ja batis min kiel malmoligendan pecon da viando!“

La viro ne sciis fari ion, escepte de li denove malfermegis la la buŝon, kaj silente etendis sian maldekstran manon al ni. Sur tiuj estis la du ‚solaj‘ antaŭdentoj, kiuj estis havinta ĝis mallonge antaŭe certan kaj pacecan hejmon en lia buŝo. Nun ankaŭ mi ekridis, ĉar li aspektis vere tro mizere. Kaj nun mi finfine transdonis la ordonon.

Antaŭzorge ĉiuj haveblaj ŝnuregoj estis alportitaj. Ili kuŝis kune kun diversaj ligiloj kaj rimenoj en la angulo, prete pro uzado.

„Do ellasu la kukluksanojn!“ mi diris. „Sed unuope! Kaj ĉiu estas katenata, kiam ili eliris. Old Death ne scias, kial oni hezitis tiel longe. Fakte la *sheriff* devus esti tie ĉi. La negro de Cortesio ja devis alvenigi lin tuj!“

„La *sheriff*, ĉu?“ Lange demandis mirigite. „Sed li ja estas tie ĉi! Nu, fine Vi eĉ ne scias, al kiu Vi ŝuldas la batojn, ĉu? Jen staras *Mr. Pike*, la *sheriff!*“

La forĝisto montris al la rigidulo.

„*By Jove, Sir!*“ mi tondrumis al la viro. „Vi mem estas la *sheriff*, ĉu? Vi estas la ĉefa ekzekucia oficisto de tiu ĉi bela *county*? Vi gardu tie ĉi la ordonon kaj la decan obeadon de la leĝoj, kaj rolas per la sama persono kiel la juĝisto Linĉo? Tio frapas! Ja ne estas miraklo, ke la kukluksanoj riskas tiel disvastiĝi en Via *county!*“

Tio igis Pike:on en nepriskribeblan embarason. Li ne vidis alian eliron, sed montri denove la du dentojn antaŭ miajn okulojn, kaj balbutis dum tio:

„Pardonu, *Sir!* Mi eraris, ĉar Vi, tute ne rigardante la maskaĵon, havas sufiĉe ege suspektan vizaĝon!“

„Nu koran dankon! Pro tio la Via nun aspektas des pli mizere. Sed faru Vian devon almenaŭ ekde nun, se Vi ne volas iĝi sub la suspekto, ke Vi volas nur tial linĉi decajn homojn, ĉar Vi kaŝe estas ano de la kukluksanoj!“

Tio redonis al li la plenan konscion pri lia ofica digno.

„Hoho!“ Pike vokis, sin rektante indignite. „Ĉu mi, la *sheriff* de tiu estiminda *county* Fayette, estu kukluksano? Mi tuj pruvos la malon al Vi. Oni procedos kontraŭ tiuj fiuloj jam ĉi tiun nokton. Paŝu reen, *meŝ'ŝur*:oj, proke ni kreas spacon por ili. Iru eksteren en la koridoron, sed lasu Viajn pafilojn videbli tra la pordo, proke la krimuloj vidas, kiu nun estas la mastro de la domo! Prenu ŝnuregojn, kaj malfermu la dormĉambran pordon!“

La ordono estis realigata, kaj ĉirkaŭ ses aŭ sep pafilaj tuboj minace iĝis en la vivĉambron. Tie nun troviĝis la *sheriff*, la du Lange:oj, Cortesio, du el la dekomence al ni aliancitaj germanoj, kaj mi. Ekstere la homamaso voke postulis rapidigon de la afero. Ni malfermpuŝis la fenestrokovrilojn, proke la homoj povis envidi kaj ekkoni,

ke ni fakte estis agantaj. Nun la stemiloj estis forigataj. Mi malŝlosis la ĉambretan pordon. Neniu el la kukluksanoj volis elveni unue. Mi postulis al la *capt'n* kaj poste al la leŭtenanto elveni. Ambaŭ estis ĉirkaŭvolvintaj iliajn lezitaĵajn manojn. Krom ili tri aŭ kvar viroj pli el la grupaĉo estis lezitaĵaj. Supre, je la malfermaĵo en la plafono sidis Old Death, kaj etendis la tubon de sia pafilo malsupren. La manoj de la trompitoj estis fiksligataj sur iliaj dorsoj. Tiam ili paŝu al iliaj ankaŭ katenitaj kunuloj, kiujn ni estis transigintaj de Cortesio. La ekstere starantoj vidis, kio okazis ĉe ni, kaj laŭte vokis halo kaj hura. Intertempe ni lasis la kapuĉojn sur la kapoj de la kaptitoj. Nur la vizaĝo de la leŭtenanto estis malmaskata plu. Per miaj demandoj kaj klopodoj viro estis alirigata, kiun oni priskribis al mi esti ĥirurgo, kaj kiu asertis, ke li kapablas bandaĝi kaj kuraci ĉiajn lezaĵojn dum plej mallonga tempo. Li devis ekzameni la lezitojn, kaj tiam forordonis plurajn La-Grange-anojn ĉien en la domon pro serĉi vaton, stupajaĵojn, ĉifonaĵojn, plastrojn, grason, soapon kaj aliajn aĵojn, kiuj necesis al li dum la agado de lia filantropa profesio.

Kiam ni finfine estis sendanĝerintaj ĉiun kukluksanon, aperis la demando, kien ili estu kondukataj, ĉar en La Grange ne ekzistis malliberejon por naŭdek viroj.

„Konduku ilin en la ĉambregon de la gastejo!“ la *sheriff* ordonis. „Plej bonas, ke oni finigas tiun aferon laŭeble rapide. Ni difinas ĵurintaron, kaj tuj realigos la juĝon. Tiu ĉi estas escepta kazo, en kiu oni agu per esceptaj rimedoj.“

La informo de tiu feliĉiga decido rapide disvastiĝis. La homamaso ekmoviĝis, kaj ĉiuj hastis al la gastejo, pro akiri bonan sidlokon. Multaj, kiuj ne sukcesis tion, staris sur la ŝtuparo, en la koridoro aŭ ekstere antaŭ la gastejo. Ili salutis la kukluksanojn per malĝentilaj minacoj, tiel ke la eskortuloj devis agi tre rezolute pro nebligaj perfortaĵoj. Nur per multe da peno ni atinigi la tiel nomatan „*saloon*“-on, pli grandan, sed des pli malaltan ĉambregon, kiu kutime estis uzata kiel ejo de dancoplezuraĵoj. La orkestrejo estis okupita, sed estis tuj malplenigata pro arigi la kaptitojn tie. Kiam oni deprenis iliajn kapuĉojn, evidentiĝis, ke ne unu sola enloĝanto de la ĉirkaŭo estis inter ili.

Post tio oni difinis la ĵurion, kiun estris la *sheriff*. Ĝi konsistis el publika akuzanto, defenda advokato, protokolanto kaj la ĵurintoj. La tribunalo estis kunmetata en maniero, kiu terurigis min, sed tio estis pardonebla per la tiutempaj cirkonstancoj de la distrikto kaj la eco de la prijuĝenda kazo.

Kiel atestantoj tieis: la du Lange-oj, Old Death kaj mi. Kiel pruvaĵoj la armiloj de la akuzatoj kuŝis sur la tabloj. Old Death prizorgis, ke ankaŭ la pafiloj de ilia kaŝejo malantaŭ la stalo estis alportataj. La *sheriff* deklaris la kunsidon inaŭgurita kun la komento, ke ne necesis ĵurigi la atestantojn, ĉar „la morala eco de la akuzantoj ne sufiĉus molesti tiel estimindajn *gentleman*-ojn kiel nin per la peno de ĵuro“. Krom la kukluksanoj entute tieis nur viroj, kies „jura kaj leĝa animstato starus super ĉia pridubo, kion li volis ĉi nun enprotokoligi je lia granda ĝojo kaj kontentiĝo“. Multvoĉa *bravo!* salajris al Pike pro tiu flatado, kaj li dankis per digna kliniĝo. Sed mi povis vidi kelkajn vizaĝojn, kiuj boneble ne tiel rekte lasis supozigi la laŭditan „juran kaj leĝan animstaton“ de la rilatitoj.

Unue la atestantoj estis aŭskultataj, el kiuj Old Death rakontadis la okazaĵojn detale. Ni aliaj povis konciziĝi per esprimi nian konsenton pri tio. Tiam stariĝis la *state-attorney*,

la ŝtataadvokato. Li ripetis niajn atestaĵojn kaj konstatis, ke la akuzintoj estis anoj de malpermesita unuiĝo, kiu strebis al la detruiga celo subfosi la leĝan ordon, damaĝi la bazon de la ŝtato kaj fari tiujn damnindajn krimojn, kiuj estus punendaj per jarlonga aŭ vivlonga mallibereco aŭ eĉ per la mortigo. Jam la membreco sufiĉus pravigi dek- aŭ dudekjaran arestadon. Krome evidentiĝis, ke la akuzintoj planadis la murdon de batalintoj pro la respubliko, la kruelan korpan mistrakton de du estimataj *gentleman*-oj, kaj la cindrigo de domo de tiu ĉi benata urbo. Kaj fine ili estis havinta la intencon pendigi du fremdajn, eksternorme pacemajn kaj dignajn virojn — dum tiuj vortoj li kliniĝis kaj al Old Death kaj mi —, kio estus treege verŝajne havinta nian ekmorton kiel konsekvenco, kaj tial ili estu senindulge punota, speciale ĉar oni ŝuldis ĵus al ni, ke la al La Grange minacinta danĝero povis esti neigita tiel feliĉe. Li tial devis urĝi al senkompata punado, kaj postulis, ke kelkaj el la kukluksanoj, kiujn la arda vido de la honorinda tribunalo estus elektonta, estu pendigotaj je la kolo, la aliaj sed vipotaj pro la propra ‚anima purigo‘, kaj poste ŝlosotaj inter dikajn murojn, proke ĝi estu estonte neeble al ili endanĝerigi la ŝtaton kaj ties honorindajn civitanojn.

Oni ankaŭ vokis *bravo!* por la ŝtataadvokato, kaj li dankis per digna kliniĝo. Post li parolis la advokato de la akuzintoj, kiu unue komentis, ke la tribunalestro estis farinta grandan nefaran pekon, per ke ĉiu akuzinto eĉ estis ne demanditaj pri sia nomo, aĝo, metio, loĝejo kaj aliaj aĵoj, kion li volis plej respektante rekomendi. Oni ja devis scii, kiun oni pendigos aŭ malliberigos, jam pro la mortatesto kaj aliaj farendaj skribaĵoj — sprita komento, kiu ankaŭ estis silente konsentate de mi. Li konfesis la menciitajn intencojn de la kukluksanoj malkaŝeme, ĉar li ja devus agnoski la veron. Sed ja neniu el tiuj intencoj fakte estis realigitaj, sed ili ĉiuj devis ĉesi sur la ŝtupo de provo. Tial oni ne povis paroli pri pendigo aŭ vivlonga malliberigo. Li ĉi rilate demandis ĉiun ĉeestanton, ĉu la nura provo kaŭzis ian damaĝon al aĵn iu, aŭ ĝenerale povus kaŭzi damaĝon. Certe ne! Do ĉar neniu damaĝo estis farinta al neniu homo, li senkondiĉe postulu absolvon, per kio la anoj de la eminenta tribunalo kaj ĉiuj kromaj honorindaj ĉeestantoj farus la pruvon de ilia filantropia kono kaj pacema, kristana animopinio. Ankaŭ pri li kelkaj malmultaj voĉoj esprimis ilian konsenton. Li faris profundan, duoncirklan kliniĝon, kvazaŭ la tuta mondo estus aplaŭdinta al li.

Post tio *Mr. Pike* stariĝis duan fojon. Unue li konstatis, ke li ne faris demandadon pri la nomoj kaj ‚aliaj tempaj kutimoj‘ de la akuzintoj plenintence, ĉar li estis tute konvinkita, ke ili estus malgraŭ ĉio mensogintaj al li. En la kazo de pendigo li tial proponus fari pro koncizeco unu solan kaj kunprenantan mortatestaĵon, en kiun oni eble skribos: ‚Estis pendigitaj dek naŭ kukluksanoj, ĉar ili kulpis tion mem‘. Li cetere konfesis, ke oni traktis nur provojn, kaj volis fari la demandon pri la kulpo nur laŭ tio. Sed oni ŝuldis nur al la du fremdaj *gentleman*-oj, ke la intenco ne estiĝis ago. La provo estus danĝera, kaj la aperigo de tiu danĝero estus punenda. Li havis nek emon nek tempon turniĝi horlonge inter la ŝtataadvokato kaj la defendanto. Ankaŭ ne povis ekidei al li okupiĝi tro longe pri grupaĉo, kiu, dek naŭ virojn forte kaj tre bone armite, lasis sin kapti de du kontraŭuloj. Tiaj herooj eĉ ne meritis la atenton de kanario aŭ de pasero. Li jam devis aŭdi, ke oni supozis lin esti amiko de la kukluksanoj. Tion li ne

povis toleri senresponde, sed li zorgos, ke tiuj homoj almenaŭ hontigite foriros kaj rezignu pri ajn iu posta reveno. Li do faris la demandon al la sinjoroj juĝintoj, ĉu la akuzintoj kulpis pri la intenco de murdo, de rabo, de korpolezigo kaj dombruligo, kaj petis, ne atendiĝi la decidon ses monatojn, ĉar ja ĉeestis amaso da altestimindaj spektantoj antaŭ la ĵurio, antaŭ kiu oni ne rajtis reteni la decidon longan tempon.

Lia ‚sprita‘ parolo estis salajrita per laŭta aplaŭdo. La sinjoroj ĵurintoj kuniĝis en angulo, interkonsilis ne pli ol du minutojn, tiam ilia parolanto transdonis ilian rezulton al la tribunalestro, kiu tuj publikigis ĝin. La juĝo estis deklaro de kulpo. Nun komencis mallauĝta interkonsilo de la *sheriff* kun siaj kunjuĝintoj. Evidentis, ke la estranta oficisto ordonis dum tiu interkonsilo, ke oni prenu ĉion el la poŝoj de la kaptitoj, kaj ke oni speciale serĉu monon dum tio. Kiam tiu ordono estis realigita, la mono estis kalkulata. La *sheriff* kontentite skuadis la kapon, kaj tiam ekstaris pro publikigi la juĝan efikon.

„*Meŝ’ŝur*:oj“, li diris, laŭ mia memoro, „la akuzintoj estis juĝintaj kulpaj. Mi pensas, ke ĝi konformas al Via deziro, ke mi diras al Vi sen multaj vortoj, kiu estos la puno, pri kies speco kaj efiko ni ĵus interkonsentiĝis. La menciitaj krimoj ne estis fakte faritaj. Tial ni decidis, laŭ la deziro de la sinjoro defendanto, kiu apelaciis al nia filantropio kaj kristana animstato, rezigni pri punado.“

La koroj de la akuzintoj estis plimalpezigitaj. Oni povis vidi tion je ili. De la spektantoj kelkaj vokoj de nekonto laŭtiĝis. Sed la *sheriff* kontinuus:

„Mi jam diris, ke la provo de krimo estas danĝero. Kvankam ni ne punos tiujn kukluksanojn, ni tamen almenaŭ prizorgu, ke ili ne povos esti danĝeraj al ni en la estonto. Tial ni decidis forigi ilin el la ŝtato Texas, fakte en tia hontiga maniero, ke certe ne ekideos al ili videbliĝi tie ĉi. Tial estas unue ordonata, ke tuj ĉiuj iliaj haroj kaj barboj estu detranĉataj ĝis la haŭto. Kelkaj el la ĉeestantaj *gentleman*:oj certe havos la plezuragon fari tion. Ajn kiu ne loĝas for de tie ĉi, iru hejmen pro alporti tondilojn. La tre estiminda ĵurio preferos tiujn ilojn, kiuj ne tondas bone.“

Ĝenerala ridado eksonis. Unu malfermŝiris la fenestron, kaj elvokegis:

„Alportu tondilojn! La kukluksanoj estu senlanigataj! Ajn kiu alportas tondilojn, estos enlasata.“

Mi estis konvinkita, ke jam en la neksta momento ĉiuj eksterstarantoj ekkuris pro tondiloj. Kaj fakte mi tuj aŭdis, ke mi supozis ĝuste. Oni rimarkis ĝeneralan kuradon kaj laŭtan vokadon pro *shears and scissors*. Unu voĉo eĉ vokis pro *shears for pruning trees kaj shears for shearing sheep*, do ankaŭ arboj kaj ŝafaj tondiloj.

„Krome estis decidata“, la *sheriff* pluigis, „ke la kondamnitoj estu kondukataj al la *steamer*, kiu venis ankoraŭ post la dek unua horo de Austin, kaj pluiros al Matagorda je la komenco de la mateno. Tie en Matagorda ili estu metotaj sur la unuan taŭgan ŝipon, kiu debordiĝos kaj ne realbordiĝos en Texas. Ili estu kondukotaj sur la ferdekon de tiu ŝipo, egale kiuj ili estas, de kie ili venis kaj kien tiu ŝipo iros. Ekde nun ĝis ilia surbordiĝo ili ne rajtas demeti iliajn maskaĵojn, proke ĉiu vojaĝanto povas vidi, kiel ni Texas:anoj traktas kuklusanojn. Ankaŭ iliaj kateniloj ne estu deprenontaj. Ili ricevos panon kaj akvon nur en Matagorda. La kaŭzotajn kostojn estu pagotaj de ilia propra mono, kiu sumiĝas al la bela sumo de pli ol tri mil dolaroj, kiun ili certe estis kunrab-

intaj. Krome ĉiuj iliaj posedaĵoj, speciale la armiloj, estu tuj konfiskataj kaj aŭkciataj. La ĵurio decidis, ke la gajno de la aŭkciado estu uzata pro la akiro de biero kaj brando, proke la honorindaj ĉeestantoj de tiu juĝado havos bonan gutajon kun iliaj *lady*:oj antaŭ la *reel*, laŭ kiu ni dancos tie ĉi post tiu konferenco, pro tiam akompani je la ekmateniĝo la kukluksanojn kun deca muziko kaj kantado de taŭga himno al la *steamer*. La kondamnitoj spektu tiun balon, kaj restu starante tie, kie ili staras nun. Se la defendanto sentas, ke li kontraŭu ion al tiu juĝo, ni ŝate pretas aŭskulti lin, se li havos la afablecon paroli mallonge. Ni ankoraŭ devas senharigi la kukluksanojn kaj aŭkcivendi iliajn posedaĵojn, do al ni estas farendaj multaj aĵoj plu, antaŭ la balo povos komenci.“

La aplaŭda vokado, kiu nun eksonis, same povus esti priskribata kiel kriado. Ĵuriestro kaj defendanto devis klopodi krei silenton, proke la advokato povis paroli.

„Kion mi ankoraŭ devas diri pro la bono de miaj komisiantoj“, li diris, „estas tio: Mi pensas, ke la juĝo de la plej estiminda ĵurion estas sufiĉe drakona, sed tiu drakoneco estas pli ol sufiĉe egaligata per la lasta parto de la ĵuria juĝo, kiu prias la bieron, brandon, dancadon, muzikon kaj kantadon. Tial mi deklaras min, en la nomo de ĉiuj, kies rajtojn mi defendu, esti konsenta, kaj mi esperas, ke la kondamnitojn lasos ĝin servi al ili kiel postulo pri komencigo de pli bona kaj pli utila vivmaniero. Mi ankaŭ avertas ilin, ajn iam poste veni al ni, ĉar mi tiukaze estus rifuzonta plufojan defendadon, kaj tiel ili ne plu trovos tian bonan defendanton denove. Mi ankaŭ mencias negoce, ke mi postulu pro mia defendado du dolarojn po viro, do por la dek naŭ viroj tridek ok dolarojn, kies ricevon mi ne devos atesti skribe, kiam mi ricevos ilin tuj tie ĉi antaŭ tiom da atestantoj. Tiukaze mi prenos por mi nur dek ok, kaj fordonos la restaĵon pro lumigo kaj luo de tiu ĉambrego. La muzikistoj povos esti pagataj per enirprezo; ĉirkaŭ dek kvin dolaroj po *gentleman*.“

La defendanto sidiĝis, kaj la *sheriff* deklaris sin tute konsentante pri tio.

Mi sidis tie, kvazaŭ mi estis kaptata en revo. Ĉu ĉi ĉio vere estis realo? Mi ne povis dubi pri tio, ĉar la defendinto ricevis sian monon, kaj multaj viroj ekkuris pro venigi iliajn virinojn al la balo. Aliaj venis kaj alportegis ĉiaspeciajn tondilojn. Unue ĉagreniĝo volas ekregi min, sed tiam mi unuanime ekridis kune kun Old Death, al kiu la finiĝo de la aventuro faris eksternorman plezuron. La kukluksanoj vere estis senharigataj. Tiam la aŭkcio komencis. La pafiloj estis rapide venditaj kaj adekvate pagitaj. Ankaŭ de la aliaj aĵoj baldaŭ nenio restis plu.

La bruego dum tio, la venado kaj forirado, la interpretado kaj puŝado estias nepri-skribebla. Ĉiu volis esti en la *saloon*, kvankam la spaco de la ĉambrego ne sufiĉis eĉ por dekono de la ĉeestantoj. Tiam alvenis la muzikistoj, klarnetisto, violonisto, trumpetisto kaj iu kun malnova fagoto. Tiu miriga orkestreto sidiĝis en angulon kaj komencis agordigi iliajn pratempajn instrumentojn, kio donis al mi ne vere agrablan antaŭsenton pri la faktaj povumoj. Mi volis foriri, speciale ĉar nun la *lady*:oj aperis sur la scenejo. Sed Old Death ne lasis min. Li deklaris, ke ni du, kiuj ja fakte estis la ĉefpersonoj, post ĉiuj penoj kaj danĝeroj ĝuu nun ankaŭ la plezurojn. La *sheriff* aŭdis lin kaj certigis tion, jes, li asertis per ĉia decidiĝo, ke estus ofendaĵo al la tuta burĝaro de La Grange, se ni rifuzus inaŭguri la unuan rondodancon. Pro tio li haveblis sian

edzinon al Old Death kaj sian filinon al mi, kiuj ambaŭ estus bonegaj dancantoj. Ĉar mi elbatis du el iliaj dentoj, kaj li batis miajn ripojn plurajn fojojn, ni devus konsideri nin kiel elektitaj afineculoj, kaj tiel mi treege afliktus sian animon, kiam mi estus malakceptinta lian peton. Li prizorgis, ke tablo por ni restu malokupata. Kion mi povis fari? Malfeliĉe la du *lady*:oj alvenis je tiu momento, kaj ni estis interkoniĝataj al ili. Kunaginta, kunkaptinta, kunpendigita! Mi ekkomprenis, ke mi devis riski fari la faman rondodancon, kaj eble kelkajn glitadojn kaj saltetojn plu, mi, unu el la herooj de tiu tago kaj — privata detektivo en sekreta misio.

La bona *sheriff* klarvideble ĝojis, ke li estis dediĉinta la diinojn de sia hejmo al ni. Li havigos tablon al ni, kiu havas la grandan mankon, ke ĝi sufiĉis nur por kvar personoj, tiel ke ni estis sen kompatato kaj karito sub la forto de la du *lady*:oj. La rango de ilia edzo kaj patro postulis, ke ili kondukis laŭeble digne. La patrino estis kvindek jara, trike prilaboradis lanan jakon, kaj unu fojon parolis pri la *Codex Napoléon*. Sed post tio ŝia buŝo fermiĝis por ĉiam. La filino, pli ol tridek jara, estis kunalportinta poezian volumon, kiun ŝi legis ŝajne neĉese malgraŭ la ĉirkaŭ muĝanta infera bruego, honorigis Old Death:on per sprite intencinta komento pri Pierre Jean de Béranger, kaj kiam la maljuna *scout* asertis sincere, ke li jam nenie estis interparolinta kun tiu *gentleman*, ŝi eksilentis kaj ne reparolis plu. Kiam la biero estis disdonata, niaj du damoj ne drinkis. Sed tuj kiam la *sheriff* alportis al ili du glasojn da brando, iliaj eĝaj, mizantropaj trajtoj ekvigliĝis.

Dum tio la digna oficisto donis al mi unu el siaj konataj bateton sur la ripojn, kaj flustris al mi:

„Nun komencas la rondodanco. Do rapide ekprenu!“

„Ĉu ni ne estos forrifuzataj?“ mi demandis per sono, kiu apenaŭ rimarkigis multe da plezuro.

„Ne. La *lady*:oj estas bone edukitaj.“

Mi ekstaris kaj kliniĝis antaŭ la filino, murmuris kelkajn vortojn pri honoro, plezuro kaj prefero kaj ricevis — la poezian libron, al kiu la *miss* ŝajne gluis. Old Death ekagis pli facilanime. Li vokis al la patrino:

„Nu, do venu, *madam*! Dekstren ĉirkaŭe kaj maldekstre reen, ĵus kiel Vi volas. Mi saltas per ĉiuj kruroj.“

Kiel ni du dancis, kaj kiun malbonaĵon mia amiko kaŭzis, perke li faligis sian kundancantinon teren, kaj kiel la *gentleman*:oj komencis drinkadi — pri tio mi silentas. Sufiĉe! Kiam la tago komencis, la rezervo de la mastro estis preskaŭ elĉerpigita, kaj la *sheriff* deklaris, ke la mono, kiu estis gajnita de la aŭkcio, ne jam estis forkonsumita, do oni povus morgaŭ, aŭ eble jam ĉi vespere danci mallongan *ree*:on plu. En la ĉambroj de la teretaĝo, en la ĝardeno kaj antaŭ la domo sidis aŭ kuŝis la ebruloj, kelkaj el ili kompreneble per pezaj kapoj. Sed tuj kiam la informo disvastiĝis, ke nun la procesio al la albordiĝejo okazu, ĉiuj ekstaris. Antaŭe stariĝis la muzikistoj, malantaŭ ilin la membroj de la ĵurio, la kukluksanoj en iliaj strangaj vestaĵoj, krome la atestintoj, kaj malantaŭ nin la *gentleman*:oj laŭ plezuro kaj prefero.

La teksasano estas stranga homspeco. Aĵn kion li bezonas, ĉiam tieas. De kie la homoj ekhaviĝis ĉion, ni ne sciis, sed egale kiom da ili enariĝis en la procesion, kaj

certe estis ĉiuj, escepte de la dignaj predikistoj kaj la *lady*-oj, ekhavis ajn iun instrumenton, kiu taŭgis pro fari muzikaĉon. Kiam ĉiuj estis enariĝintaj, la *sheriff* mansignis, kaj la procesio ekiris, kaj la antaŭe paŝantaj *artistoj* komencis la *yankee-doodle*-on. Je la finaĵo la aliaj muzikaĉistoj komencis kunludi. Kio estis kune fajfata, kriata, kantata, tio estas nedirebla. Estis, kvazaŭ mi troviĝis inter amaso da frenezuloj. Tiel oni atingis per funebra marŝo la riveron, kie la kaptitoj estis transdonataj al la kapitano, kiu igis ilin, kiel ni certigis, sub certan gardon. Ne eblis fuĝo al ili, tion la kapitano garantiis. Krome ili estis gardataj de kelkaj kunvojaĝantaj germanoj.

Kiam la ŝipo ekdebordiĝis, la muzikistoj ludis ilian plej belan salutajon, kaj la muzikaĉo komencis denove. Dum la okuloj de ĉiuj atentiĝis pri la ŝipo, Old Death ekprenis mian brakon kaj ni iris hejmen kune kun Lange kaj sia filo. Tie ni decidis fari mallongan dormadon. Sed tio daŭris iomete pli longe ol ni estis planintaj. Je mia veko Old Death jam estis vigla. Li ne estis povinta dormi pro la doloroj en la kokso, kaj li deklaris je mia teruro, ke estus neebla al li forraĵdi jam hodiaŭ. Tio estis la malbona konsekvenco de sia falo dum la dancado. Ni venigis la ĥirurgon. La viro venis, ekzamenis la leziton kaj deklaris, ke la kruro estis elklikita el la korpo, do devis esti reen enklikata. Plej ŝate mi estus doninta al li vangofrapon. Duonan eternecon li preme traktadis la kruron kaj certigis, ke ni povus aŭdi, kiel ĝi enklikus. Ni auŝkultis, sed vane. La premado kaŭzis preskaŭ neniun doloron al la *scout*. Tial mi ŝovis la plastrulon flanken kaj vidis al la kokso. Tie estis blua makulo, kiu havis flavan randon, kaj mi estis konvinkita, ke tio estis kontuzo.

„Ni prizorgu enfrotadon kun sinapa aŭ pura alkoholo, tio rerektigos Vin“, mi deklaris. „Sed certe Vi almenaŭ hodiaŭ restu trankvile. Domaĝe, ke Gibson intertempe forfuĝos!“

„Ĉu tiu?“ la maljunulo respondis. „Ne afliktiĝu, *Sir*! Kiam oni nur direktigis la nazon de tiel maljuna ĉashundo kiel mi sur spuron, ĝi certe ne trankviliĝos ĝis la lepono estas kaptita. Vi trankvile fidu pri tio.“

„Tion mi faras. Sed li ricevos tro grandan antaŭecon kun William Ohlert!“

„Tiun ni malgrandigos. M'taksas, ke egalas, ĉu ni trovos ilin tagon pli aŭ malpli frue, se ni nur ajn iel trovos ilin. Ne malesperu! Tiu tre honorinda *sheriff* ete fuŝis nian aferon per sia *reel* kaj siaj du *lady*-oj, sed Vi povas fidi pri tio, ke mi reĝustigos ĉi ĉion. Oni nomas min Old Death. Ĉu komprenite?“

Tio certe sonis konsolige, kaj ĉar mi fidis al la maljunulo, ke li plenumigus sian promeson, mi klopodis esti senzorge. Mi ja ne volis foriri sole. Tial mi ja ĝojis, kiam Lange ripetis dum la tagmanĝo, ke li volis vojaĝi kun ni, ĉar lia vojo estis komence la sama.

„Vi ne ricevos malbonajn kamaradojn per mi kaj mia filo“, li certigis. „Ni scias kiel regi ĉevalon kaj trakti pafilon. Kaj se ni trovos iajn blankajn aŭ ruĝajn fiulojn sur la vojo, ne ekideos al ni forkuri. Do, ĉu Vi volas kunpreni nin? Akceptu!“

Kaj ni akceptis. Pli poste venis Cortesio, kiu estis dorminta eĉ pli longe ol ni, kaj volis montri la du ĉevalojn al ni. Old Death lamis malgraŭ la dolorojn sur la korton. Li volis vidi la ĉevalojn mem.

„Tiu juna *master* ja asertas, ke li povas rajdi“, li diris, „sed niaspecaj homoj ja scias, kion oni pensu pri tiaj paroloj. Kaj ankaŭ mi ne konsideras lin kapabla pritaksi ĉevalojn. Kiam mi aĉetas ĉevalon, mi eble elektos ĵus tiun beston, kiu ŝajnas esti la plej malbona, dum nur mi scias, ke ĝi estas la plej bona. Tio jam okazis ne nur unu fojon.“

Mi rajdu ĉiujn la ĉevalojn, kiuj estis en la stalo, kaj li rigardis ĉiujn iliajn moviĝojn per sperta mieno, post li estis demandita gardiĝe pri la prezo. Fakte okazis tio, kion li antaŭdiris kaj mi ekspektis. La ĉevalojn, kiuj estis elektitaj por ni, li ne prenis.

„Ili aspektas pli bone ol ili estas“, li diris. „Ili estus elĉerpotaj jam post kelkaj tagoj. Ne, ni prenos tiujn du maljunajn ruĝfelulojn, kiuj estas strangamaniere tiel malmultekostaj.“

„Sed tiuj ja estas nur porĉaraj bestaĉoj!“ Cortesio komentis.

„Tiel Vi juĝas, *señor*, ĉar Vi — pardonu — ne ĝin scias pli bone. La ruĝfeluloj estas preriaj ĉevaloj, nur estis tenitaj malbone. Tial ili ne faras bonan impreson nun. Ili certe ne perdos la spiron, kaj mi taksas, ke ili ne eksvenos post eta streĉiĝo. Ni prenos ilin. Jen mia mano!“